  - 2.1. Publika agado
  - 2.2. Eldona agado
  - 2.3. Instruado
  - 2.4. Aranĝoj
  - 2.5. Butik'
3. Komparo de la Teksto pri Ĝenerala Politiko de la estraro kaj de la agado 2004-2005
4. Financa raporto



siège EO Jeunes

### 1. Administrado

#### 1.1. La estraro (raportas Aleks Kadar)

La estraro, elektita de la komitato en St-Denis en Val dum Festo 2004 aŭgustmeze, konsistis el: Axel Rousseau, prezidanto, Sébastien Merlet (Sebeto), vicprezidanto, Sébastien Montagne, kasisto, Aleks Kadar, sekretario, Cyrille Poulet, vicsekretario. La estraro kunvenis plurfoje en Parizo, kaj inter tiuj fizikaj kunsidoj la estraranoj preskaŭ ĉiutage interrilatis per reto, interalie por pritrakti urĝajn aferojn.

#### 1.2. La komitato (raportas Aleks)

La konsisto de la komitato, je la 15-a de aŭgusto 2005, estis la rezulto de la elektoj dum Festo 2004. Anis ĝin, krom la 5 supre menciitaj estraranoj: Benoît Fonty, Christophe Chazarein, Emmanuel Debanne, Flavie Audibert, François Hoeltzi, Gérald Tibi, Isabelle Clopeau, Ludivine Delnatte, Maité Gayet, Méline Desnos, Mikael Ponsardin, Tanja Malezh, Tifen Rabineau. Entute 19 homoj.

La komitato kunvenis kvarume 4 foje:  
 - unue kiam ĵus elektinta, por elekti la estraron,  
 - due, 2-an de oktobro 2004 en la Ĉerizejo,  
 - triafoje dum IS 2004,

- kvarafoje dum la Francilia Semajnfino en Poissy, la 2-an de aprilo 2005.

Tie oni diskutis pri la diversaj projektoj (Tinĉjo, Gastono, parrainage ktp) kaj tagordadoj (junuldungito, Butik', financoj, Boulogne 2005, FESTO ...)

#### 1.3. La Ĝenerala Asembleo 2004 (raportas Aleks)

Ĝi arigis ĉ. 16 membrojn, inter kiuj 11 aktivajn kun voĉdonrajto, lastan tagon de Festo 2004, en St-Denis en Val apud Orléans, sabate 14-an de aŭgusto 2004 posttagmeze 14h 30 - 17 h 30.

#### 1.4. Membraro MEMBRONOMBROJ ESTOS DISKONIGATAJ DUM FESTO 2005

Je 15-a de aŭgusto estas ĉ. .... membroj ĉe JEFO (ĉ. 180 membroj en 2004), el kiuj proksimume triono havas malpli ol 30 jarojn (en 2004) En 2005 estis lanĉita l'Opération Parrainage, kiu premias per muzik-KD-j la membrojn, kiuj sukcesas membriĝi al JEFO 5 novajn membrojn.

<http://fr.groups.yahoo.com/group/jefo-membroj/message/2573>

#### 1.5 Rilatoj kun TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) (raportas Aleks)

Espéranto-Jeunes estas reprezentata de Sébastien Montagne kiel Komitatano A ĉe la komitato de TEJO. Li reprezentis JEFO-n dum la Komitatkunsido de TEJO dum IJK 2005 en Zakopane.

#### 1.6. Rilatoj kun «Espéranto-France»

Daŭris dum la tuta jaro aktiva interfluo de informoj, kiu faciligis kaj glatigis la rilatojn inter la du asocioj. JEFO regule provizas artikolojn por enmeti en la «Mondo de Esperanto» (LME).

#### 1.7. Junuldungito

Willy estis dungita septembre por fari diversajn taskojn en la sidejo, kaj lia ĉeesto ebligis pliampleksigi la malferm-horaron de la sidejo. Li okupiĝis i.a. pri sendado de la revuo JI al membroj, pri disdonado de kalendarioj antaŭ universitatoj kaj surstrate ktp. Oni akiris porteblan komputilon por li kaj por ebligi pli facilajn prezentojn dum diversaj foiroj, ĉe budoj.

Sed la afero kun la junuldungito ne tiom bone disvolviĝis, li estis maldungita antaŭ fino de lia kontrakto. Tro temporabis al lia prizorganto prizorgi lin sufiĉe kaj bone.



conseil d'administration  
Trésoriers



## 2. Agado

### 2.1. Publika agado kaj informado

**Stando ĉe Homara Festo** (Fête de l'Humana) : septembro 2004. Surloke sukcesa disdonado de ĉ. 8 000 ruĝaj kalendaretoj, sed kvazaŭ nenioma post-efiko, pro nekolektado de adresoj.

#### Stando ĉe Expolangues :

tre sukcesa en 2005, pro zorga antaŭ-organizado kaj posta utiligado de la kolektitaj kontakt-adresoj (relanĉa kampanjo, publika kunveno, semajnfina kurso...)

Vidu la artikolon en la retejo de JEFO :

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=106](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=106)

Disdonado de la PakEo al ĉeestintoj de la fulmkurso de Henri de Sabates, vendado de multaj KD-romoj *lernu!*, de kelkaj komiksoj, kaj ĉefe disdonado de miloj da verdaj kalendaretoj. Post Expolangues, okazigo de sideja prezento sabaton 19-an de februaro kaj de 2-taga staĝo 9-an kaj 10-an de aprilo.

#### Projekto Universitatoj :

Projekto ligita al la disvendado de la lernu-KD-j

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=102](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=102)

(havebla ekde januaro 2005, aĉetebla je 2 €, inter 1 kaj 9 ekzempleroj, kaj je 1 €, por pli ol 10 ekzempleroj), kaj al la disdonado de la kalendaroj. Ĉe-universitataj disdonadoj de kalendaroj okazis kelkfoje: en Parizo, Bruselo, Bretonio ktp.



#### Kalendaroj :

Ekpensado de ili dum la Somera Universitato EDE 2004 en Grezjono, presado de 20000 ruĝaj je 535,81€, disdonado unue dum la Homara Festo 2004 (ĉ. 8000)

Presado de 50000 verdaj (dua generacio, duoble pli grandaj) je 1200,59 €.

Multe laboris pri iliaj engaĝigo kaj realigo: Sébastien 'Sebeto' Merlet, Sébastien Montagne, Emmanuelle Richard, Baptiste Darthenay.



#### Zam' Radio :

JEFO faras ĉiumonatan radioelsendon 90 -minutan en la pariza radio «Radio Libertaire» 91.4. Enhavo: novaĵoj, muziko, intervjuoj, dulingvaj babiladoj ktp. Aparte menciindas, ke la 4-an de marto 2005 dissendiĝis speciala intervjuo de konata lingvisto Claude Hagège. Teamanoj estas Cyrille Poulet, Aleks Kadar, kaj multaj invititoj.

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=107](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=107)

#### Retejo :

<http://esperanto-jeunes.org/>

Krom jamaj menciitaĵoj, estis aldonitaj al la retejo de JEFO, ĉefe de Emmanuelle Richard:

#### - Fotogalerio:

<http://esperanto-jeunes.org/galerie/>

- Kvizo, fine de kiu kvizintoj povas peti la JI-n:

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=131](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=131)

- **Diaporamaoj** Kie kiel kial, KD-romo lernu, fulmkurso:

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=105](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=105)

### 2.2. Eldona agado

#### Tinĉjo en Tibeto

Aĉeto de 500 ekzempleroj al Lille-Villeneuve-Espéranto (LVE) je ĉ.4000 €

Vendado de 150 far JEFO, ĝis nun, je unuopa prezo de 11,50 € (sen sendokostoj)

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=114](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=114)



#### Gastono

Eldonado de 1100 ekzempleroj por tuta sumo je ĉ. 4000 €

Vendado de ĉ. 654 por tuta sumo je 3354 € (fakte la rezulto pli altas, vendiĝis pluraj en IJK/IJS, sed ili kalkuliĝos en venonta agad-periodo).

Vendoprezo por unuopa komikso: 8 €.

Gastono estis projekto 100%-a de JEFO, eldonita de JEFO, kun tradukado de David Hromada, engaĝigado de Armelle Piolet, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, korekto de Xavier 'Zav' Godivier, Jean Lazert, Laurent Vignaud.

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=119](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=119)



Le traducteur principal de Gaston

#### Le Petit Spirou

Decido prenita julie eldoni ĝin en 2005/2006, pro kontentigaj vendo-kvantoj de Gastono.

#### JEFO-Informas

Eldoniĝis pli malpli regulare nia oficiala revuo JEFO-Informas. Redaktas ĝin ekde 2005 Christophe Chazarein, ĉef-korektas kaj engaĝigas Tifen Rabineau. Ĝi aperis trifoje en 2004, inkl. papera Volapug decembre, tiam kun ĉefredaktado kaj engaĝigado de Cyrille Poulet. Kaj dufoje en 2005 jam, la dua numero ekpresiĝis julie kaj alvenos baldaŭ.



### Verda Krabo :

Ĉiumonate aperas la franclingva reta informletero de JEFO, la Verda Krabo, dissendita pere de Yahoo-grupoj al pli ol 1500 abonantoj. Aperis jam 29-foje.

Kaj 9-foje dum la agadraport-periodo. En la 20-a numero estis konkurso, kun premioj, kiuj estis senditaj al la 9 gajnintoj aŭtune 2004. Ekde la numero de februaro 2005, nova redaktora teamo zorgas pri la VK, ĉirkaŭ ĉef-redaktanto Axel.

Kontribuintoj al VK: Emmanuelle Richard, Jerome Charbonnel, Cyrille Poulet, Aleks Kadar

<http://verdakrabo.esperanto-jeunes.org>

Jen temoj de la pasintaj numeroj :

N° 29 – juillet 2005 : Du nouveau dans la BD en espéranto

N° 28 – juin 2005 : Littérature en espéranto

N° 27 – mai 2005 : Venez tous à Festo !

N° 26 – avril 2005 : Un siècle d'espéranto, et même un peu plus...

N° 25 – mars 2005 : un nouveau joujou qui fait fureur : le Blog

N° 24 – février 2005 : Espéranto et cinéma

N° 23 – janvier 2005 : L'espéranto dans l'est de la France

N° 22 – décembre 2004 : L'espéranto dans la région du Nord

N° 21 – novembre 2004 : La Bretagne, ça vous-gagne

### Membro-libreto :

Ĝisdatigita de Axel kaj Emmanuelle, ĝi estis enretigita en la JEFO-retejon la 14-an de julio 2005. Ĝi estas elŝutebla je PDF-formato kaj prezentiĝas kiel 24-paĝa libreto en A5-grandeco.

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=132](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=132)

### 2.3. Instruado

Daŭras la 3 kursoj: DLEK, Gerda, Ikurso, sen paroli pri lernu (kiu havas laŭdire pli ol 300 franclingvaj lernantoj).

Kunordigantoj: 3 (ikurso)

Emmanuelle Richard, Ingrid Malaquin, Axel Rousseau

Korektantoj: 100 (ikurso)

Novaj lernantoj ĉiumonate: 100 (ikurso)

Dum la agadraport-periodo (12 monatojn): entute 996 kursanoj, el kiuj 164 finis la kurson (16,5%)

<http://ikurso.esperanto-jeunes.org>

### 2.4. Aranĝoj

#### FESTO 2004

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=84](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=84)

57 partoprenintoj, kontentaj, en St-Denis en Val apud Orléans, Centro.

### Sabatoj de JEFO / Samedis de JEFO

Dum la periodo okazis en la pariza sidejo pluraj 'Sabatoj de JEFO' pri diversaj temoj, inter alie:

16 10 2004: kvizo kaj vjetnama lingvo,

30 10 2004: aktivula sabato plus benina lingvo,

04 12 2004: Filmo Le Mecano de la General + ido-prelego,

18 12 2004: Jul-Afrika-Zam Sabato,

15 01 2005: libroservo-kunsido, brokanto, JI-enko-vertigado, fotoj IS, Flaŭno de reĝoj,

29 01 2005: spécial Expolangues + visite de russes,

05 02 2005: prelego de Jean pri Magiaj kvadratoj / Prezentu vian plej sxatatan libron,

05 03 2005: filmo Angoroj de Jacques-Louis Mahé

19 03 2005: ni prezentu la JEFO-agadojn per farado de ekspozicio-panelo, por Boulogne 2005

30 04 2005: luda posttagmezo,

07 05 2005: debato pri la «Eŭropa Konstitucio, kialne?»,

21 05 2005: JEFO faras filmojn – verkado de scenaro por la FESTO-filmeto.

04 06 2005: Rusa kulturo k lingvo: rusaj animaciaj filmoj, kun Tanja Malejh kaj Anna Chaykova. Blinis

02 07 2005: brokantaĵoj pri libroj, muzikaj KD-j kaj T-ĉemizoj, pikniko poste ĉe la haveno Arsenal

16 07 2005: pikniko kun usonanina gasto

### Boulogne 2005 (mart-fine)

10-o de JEFO-anoj partoprenis deĵorante la manĝo-kaj trink-budon, por la kongresanoj.

Bicikla Semajnfino 2-a de aprilo 2005

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=110](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=110)

Kunlabore kun la Francilia Federacio. Dum ĝi okazis komitatokunsido de JEFO.

### IASI 21-22 majo en Liono

Partopreno de JEFO al tiu Inter-Asocia Seminario pri Informado.

Elpensado kaj ekkreado de novaj informiloj, kompilantaj la ekzistantajn: unu unuanivela, le Tract, kaj unu duanivela. JEFO estis reprezentita i.a. de Sébastien Montagne.

### 2.5. Butik'

Kunfandiĝo en 2005 kun la libroservo de UFE, interkonsento atingita: JEFO havas ekskluzivecon pri komiksoj kaj muzik-KD-j. Flanke de JEFO respondecas pri la Butik' Cyrille Poulet.

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=22](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=22)



Festo 2004



Expolangues 2005



Samedi de Jefe



Conseil d'administration octobre 2005



# Praktikaj konsiloj de sperta Esperanto-renkontiĝo-partoprenanto

On donderdag, jul 21, 2005, at 12:40 Europe/Amsterdam, Aleks K. skribis:

Karaj organizantoj,

Tre grava demando, preparante mian valizon:

Ĉu estos lavmaŝino, kaj sekigilo, por vestaĵoj, en la IJK-ejo??

Alivorte: ĉu mi bezonas preni 3 semajnojn da vestaĵoj por la 3 semajnoj (UK-IJK-IJS) aŭ ĉu sufiĉos 1 aŭ 1,5 semajnoj da?

Antaŭdanke por rapida respondo (mi ĉion envalizigas morgaŭ jam)

Amike, Aleks



En pri-ijk, Dmitri Horowitz skribis / Lun 25 07 05:

Por Aleks jam tro malfruas, ĉar li supozeble jam forvojaĝis. Sed por ĉiuj aliaj kiuj luktas per la sama problemo: jen kelkaj praktikaj konsiloj de sperta E-renkontiĝo-partoprenanto. Kiam oni pripensas kunporti vestaĵojn por tri semajnoj kaj vojaĝas per aviadilo, oni konsideru, ke ĝenerale oni ne rajtas kunporti pli ol 20 kilojn da pakaĵo, aŭ oni devas krompagi. Krome restas la demando kiel porti 20 kilojn al la flughaveno, kaj poste de la flughaveno al la ejo - eble oni luu aŭton aŭ azenon surloke. Se mankas lavmaŝino, ĉiam restas la eblo lavi per la mano. En bonaj tendumilaro-vendejoj haveblas speciala kompakta deterganto (ofte en tubo) por dorsosakaj aventuristoj, kiuj faras ekspedicion al Amazonio aŭ Himalajo, aŭ por BEMI-anoj. Certe sufiĉe taŭgas por la primitivaj cirkonstancoj, kiujn oni ĝenerale trovas en urbetoj kie okazas E-renkontiĝoj.

E-istoj kiuj estas iom pli riskemaj povas provi aĉeti deterganton surloke. Lokaj superbazaroj ĝenerale vendas deterganton por manlavado (pulvoran aŭ likvidan), precipe en turistaj lokoj. (Mi ne tiom spertas pri Pollando, sed mi kredas ke ekzistas iu Eŭropa normo, kiu priskribas ke en ĉiu EU-membra lando haveblu manlava deterganto, kiu kongruu al iuj EU-aj normoj. Se neniu vendejo en Zakopane havas, mi vetas ke ja troveblas ĉe Pjotr i Pavel en Poznan, kiu malfermas 24-hore).

(En landoj kie evolua nivelo estas tiom malalta, ke oni ne trovas deterganton en bazaro, oni ĝenerale trovas lavistinojn, kiuj servas je favoraj prezoj, aŭ oni entute ne ĝeniĝas pro malpuraj vestaĵoj. Do ankaŭ ekster EU oni ne havos problemon). Restas la demando, kion fari en loko kiu estas tiom primitiva ke mankas eĉ bankuvo aŭ lavtablo, kaj kiu tamen troviĝas en EU-lando. Bona ekzemplo estas la ejo kie okazas MELA.

Mi ne scias ĉu ĉiuj enloĝantoj de Deleghaza lavas nur per maŝino, sed eĉ se haveblas nur pormaŝina deterganto, ekzistas solvo. Oni metu la malpuran vestaĵon kun akvo kaj deterganto en plasta sako kaj fermnodu ĝin. Per turnado de la sako, oni povas similigi movadon de lavmaŝino. Finfine praktika konsilo por tiuj, kiuj planas kunporti likvidan deterganton en aviadilo. Portu ĝin en la manpakaĵo, neniam en la ĉefpakaĵo. En aviadila pakaĵejo estas malalta aeropremo dum la flugo: pro tio ujo kun likvidaĵo povas eksplodeti kaj malsekigi ĉiujn viajn vestaĵojn. Tiu konsilo fakte validas por ĉiuj likvidaĵoj, kiel ekzemple ŝampuo, kontaktlensfluidaĵo aŭ tekilo.

Alternative oni povas prepari likvidaĵon en plasta ujo por la flugo laŭjane: malfermu la ujon, premu iom, ellasante iom da likvidaĵo, kaj dumpreme refermu la ujon firme. Tiel oni kompensas la malaltan aerpremon. Por kroma certeco, oni paku la ujon en plasta sako. (Mi ne akceptas respondecon pri tiu ĉi lasta konsilo. Mi mem ĝis nun ne provis tion).

Ĝis IJK, IJS kaj MELA,  
Dmi3

## SOMOSO (SMS) PER ESPERANTO, ESPEPRANTO PER SOMOSO

Tintis mia poŝtelefono. Mi legis, ke estas mesaĝo. Mi devis malkovri la enhavon. Jen do franca teksto aperis. Mi rekonis la skribinton. Li estas Benina Esperantisto. Mi tuj respondis ne en la franca, sed en Esperanto. Plia mesaĝo lia venis tagojn poste, nun en Esperanto. Li forgesis akuzativon kaj aliloke misuzis ĝin. Mi respondis korektante la teksteton. En aliaj tagoj devis atingi min «somosoj» interne de Togolando, kaj ankaŭ de ties ekstero. Pliafoje mi forigis skoriojn. Naskiĝis do en mi ideo pri uzo de tiu ĉi ilo por disvastigi Esperanton.

Pasis tagoj, kaj aferoj strebis al maturiĝo. Pli ol dek somosoj ricevitaj el ekster Togolando plupensigis min. La kurso de TIETo/UTE en aŭgusto 2005 devigis min aliri somosojn. Mi skribis al kursano. Venis respondo ne en Esperanto sed en la franca. Mi tuj reagis, ke mi ne komprenas. Kelkajn minutojn poste aperis Esperanta teksteto kun misvortoj. Mi ne korektis, ĉar multon mi devus klarigi. Mi renkontis la skribinton kaj klarigis la aferojn al li parole. El liaj reagoj mi komprenas ke manko de praktikado helpis lin forgesi la malmulton, kiun li konas. Necesas ĉiam uzi la malmulton kaj plie kapti aliajn vortojn.

Mia regula rilatado somosoa kun li devigis lin uzi sian vortareton. En mia lasta mesaĝo al li, mi uzis la vorton RONKI. Venis reago, ke li nenion komprenas. «serĉu kaj vi trovos» estis mia respondo. Kelkajn minutojn poste venis mesaĝo, per kiu li montris sian nekontenton «Mi neniam ronkas». Mi ĝojas, ke li kaptis la signifon de la vorto. Mi komprenas, ke mi daurigu kun aliaj komencantoj, kaj mi jhus trafis alian. Sukceson en tiu ĉi vojado, sed ĉu facilas?

La voja estas vere facila kaj rapida kaj ntemporaba, sed ĝi konsumas, precipe kiam temas pri vokoj. Tiom kostas la telefonkartoj ke instruistoj kaj instruatoj malfacile uzos la vojon por voki, sed ja por somosi, ĉar ĝi estas tre praktika kaj simpla. Kion nun fari por kuraĝigi tiajn komencantojn?

Necesas, ke esperantistoj tra la mondo sendu somosojn al afrikanoj, precipe al komencantoj, kiuj tiel ekuzos la malmultajn vortojn, kiujn ili ĵus lernis. Kolektado de telefonnumeroj ĵus komenciĝis. Ankaŭ eksterafricanoj bonvolu disponigi siajn al la Afrika oficejo.

Koffi GBEGLO

## 62-a IJK en Sarajevo



### SARAJEVO INVITAS...

Vi certe jam scias ke la 62-a IJK okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 2006 en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino.

Loka Kongresa Komitato elkore invitas junajn francajn Esperantistojn partopreni tiun ĉi eventon. Espereble multaj membroj de la franca movado, ne nur gejunuloj, rekonos la ŝancon viziti Sarajevo kaj samtempe partopreni IJK-n.

Jen nova ebleco ĝui eksterordinaran kongresan etoson kaj profundigi bonajn rilatojn inter niaj movadoj.

La kunvivado de diversaj popoloj, religioj kaj kulturoj havas jam plurjarcentan tradicion en Sarajevo. Nek teruraj okazaĵoj dum lastaj dek jaroj malharmoniigis la urbon. En la nuntempa malfermiĝo kaj akceptado de tutmondaj normoj, pro sukcesa konservado de siaj kutimoj kaj la tradicia kunvivado de malsamaj religioj, kulturoj kaj etnoj, Sarajevo ŝajne estas la plej bona loko por diskuto pri la nuntempeco, la tutmondiĝo kaj la konservado de tradicioj, multkultureco kaj toleremo.

Grandaj olimpikaj montaroj, fonto de la rivero Bosno, neolitika trovejo Butmir, riĉa nokta, kultura kaj arta vivo, bonega gastronomia oferto – ĉio troveblas nur duonhoron for de la kongresejo.

Por akurataj informoj pri la aliĝreguloj kaj la kongrespreparoj, bonvolu viziti nian retpaĝaron: [www.esperanto.ba](http://www.esperanto.ba)

Bonvenon en Sarajevo!

*Prezidantino de Loka Kongresa Komitato  
Vildana Delalić*

### « Feliĉan Kristnaskon ! » : Utopia momento en 1914.

Ne temas ĉi-tie pri dika ruĝa Kristnaska Paĉjo kaj ludilkonstruantaj Nkoboldoj sed pri belega filmo, kiu aperis kinejen dum novembro 2005. Tiu franca filmo (subvenciita de Francio, Belgio, Germanio, Anglio kaj Rumanio) rakontas pri mirakla momento, kiam francaj, skotaj kaj germanaj soldatoj, fronte unu al la aliaj en tranĉeoj, decidis militpaŭzi dum Kristnasko 1914.

Apud nordfranca vilaĝeto kelkaj militistoj interkonsente ĉesis pafi dum 2 tagoj, por kune festi Kristnaskon, kanti kaj trinki, intersxanĝi cigaredojn kaj ĉokoladon, ludi futbalon kaj ekamikiĝi. Post tiu nekredebla sed tamen vera momento (ja temas pri vera rakonto), estis kompreneble malfacile denove celumi al alilanda homo, kun kiu oni festis la pasintan tagon ... Mi ne rakontos kio okazis poste, eĉ se eblas facilas diveni. Multaj kritikistoj opiniis la filmon tro naiva, sed ĉu estas tiom malfacile imagi homojn amikiĝi anstataŭ militi ?

La sola afero, kiu iom ŝokis min dum la filmo, estis la uzo de la angla kiel komunika lingvo. Ĉu jam en 1914 francoj kaj germanoj povis tiom flue paroli la anglan lingvon ??

Se vi do ne jam spektis tiun filmon, nepre luan la DVD-n !!

*Ludivine*





# Fabriquer une BD en espéranto

Ça y est : le contrat avec l'éditeur est signé, la traduction est terminée, il ne reste plus qu'à fabriquer l'album. Explications en images de la fabrication du 2ème album édité par Esperanto-Jeunes : «La Eta Spirou -Salutu la sinjorinon» (Le Petit Spirou : «Dis bonjour à la dame»).



Les fichiers originaux sont fournis par Dupuis, l'éditeur du Petit Spirou : un fichier au format Quark Xpress contenant les 48 pages de l'album, un autre pour la couverture, ainsi que toutes les images de l'album. Les images sont dans une définition élevée (1200 dpi), aussi est-il nécessaire d'avoir un ordinateur doté de suffisamment de mémoire (1 Go) pour pouvoir travailler sur ces fichiers plutôt volumineux.

Il faut aussi un logiciel de retouche d'image permettant de créer des effets de texte et des déformations d'images pour reproduire le lettrage d'origine.



Chaque page de l'album se compose de trois images superposées :

- une image contenant la couleur uniquement
- une image contenant le dessin (traits noirs)
- une image contenant le texte (en français dans les fichiers fournis par l'éditeur).

Lors de l'impression, les trois images sont superposées. Ceci permet d'imprimer en même temps des albums en langues différentes, car une seule des couches diffère dans chaque édition (ce qui permet de faire baisser les coûts de fabrication).

Chaque planche est traitée séparément. À l'aide du logiciel de retouche d'images, on travaille sur trois calques superposés : le dessin au trait qui permet de visualiser la structure de

la planche, le texte en français que l'on rend translucide et qui sert de guide et un nouveau calque qui contiendra le texte en espéranto. Lorsque la page est terminée, c'est ce dernier calque que l'on enregistre et que l'on enverra à l'imprimeur.

On procède ainsi pour chaque planche, sans oublier la couverture. En tout, cela représente une demi-heure à une heure de travail par page... sans compter la relecture et les discussions avec les traducteurs. Une traduction peut en effet toujours être améliorée et de nouvelles idées jaillissent lors des relectures.

Pour faciliter le travail en équipe, nous avons recours à un wiki\*. Ainsi, pour chaque page, les traducteurs et les relecteurs ont à leur disposition un espace où ils peuvent noter leurs remarques, leurs questions et prendre des décisions en commun.

Lorsque tout a été lu et relu, il ne reste plus qu'à assembler les images dans le fichier Xpress avant de l'envoyer à l'impression. C'est alors que l'on s'aperçoit que la 4<sup>ème</sup> de couverture n'est pas encore tout à fait prête, qu'il faut rédiger le texte de présentation, générer le code barre, ne pas se tromper en recopiant le n° ISBN et relire attentivement le tout pour être sûr de ne pas avoir laissé de coquille !

Quelques semaines plus tard, l'éditeur nous envoie un Ozalid, c'est-à-dire une épreuve de contrôle qu'il faut valider avant le lancement de l'impression.

Emmanuelle


**2 décembre 2005 : ça y est ! Nous avons le plaisir de feuilleter les albums qui viennent d'être livrés.**

Vous aussi, profitez-en et commandez le de suite vos albums sur notre site internet ou en utilisant le bon de commande page 14.

[http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id\\_article=140](http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=140)



\* Un wiki est un site web dynamique permettant à tout individu d'en modifier les pages à volonté. Wikipedia, l'encyclopédie en ligne, est la plus grosse wiki du monde.





## Comment motiver une équipe :

**Samedi 27 août – 11 h 37 :** je viens de terminer le lettrage de l'album du Petit Spirou. Il faudrait que les correcteurs relisent rapidement les planches car l'échéance approche rapidement et il reste encore pas mal de travail à faire avant d'envoyer les fichiers définitifs à l'imprimeur. Mais voilà, c'est l'été, tout le monde a sûrement mieux à faire, les relecteurs ont été pas mal sollicités ces dernières semaines et n'ont plus trop de temps à y consacrer ... Il faudrait cependant qu'ils puissent relire tout l'album avant demain soir. Occupée aux fourneaux, je réfléchis à la façon de leur demander l'impossible une fois de plus. 13 h 49 - ça y est, j'ai envoyé mon message :

**[publicitaire]** Bravo ! Vous avez gagné ! Vous faites partie des quelques privilégiés qui auront la chance de pouvoir relire les planches du petit Spirou en espéranto, avant même leur envoi chez l'imprimeur ! Si vous voulez profiter de cette offre exceptionnelle, allez vite consulter le wiki et notez-y sans attendre vos remarques ! Attention, cette offre a une durée limitée. Répondez vite ! Ne laissez pas passer votre chance !

**[dépêche]** Selon les dernières informations d'Espéranto-Jeunes, la mise en page du premier tome du petit Spirou en espéranto serait en passe d'être terminée. Pour l'instant les responsables n'ont pas encore diffusé les planches mais il semblerait que quelques relecteurs triés sur le volet auraient accès à ces documents. Aucune autre information n'a été diffusée pour l'instant. On attend la réaction des relecteurs.

**[enthousiaste]** Ouaaaaah !!!! C'est génial !!!! C'est super-fun, comme truc. La chance que t'as !!!! Relire les planches du spirou en Espéranto avant la sortie officielle. Et en plus tu peux ajouter tes remarques perso dans le wiki, c'est trop cool ! Si j'étais toi, je lâcherais tout et je foncerais tout de suite là-dessus !

**[arithmétique]** Un relecteur doit relire 47 pages de bandes dessinées avant l'envoi chez l'imprimeur. Sachant qu'il met en moyenne 10 minutes pour relire et annoter une page et qu'il peut consacrer 2 heures par jour en semaine et 4 heures par jour le samedi et le dimanche, à quelle date aura-t-il terminé, sachant qu'il commence sa relecture le samedi après-midi ?

**[faire-part]** Emmanuelle a la joie de vous faire part de la naissance de son petit frère : Spirou né le samedi 27 août à 11 h 37, il pèse 47 pages.

**[suppliant]** Dis, s'il te plaît, tu pourrais pas relire les 47 pages du Spirou en espéranto ? C'est pour que ça soit encore mieux parce qu'après ça sera trop tard. Ce serait dommage qu'il reste des petites fautes alors qu'il ne fallait que quelques minutes pour jeter un coup d'œil. Tu fras ça pour moi, dis, hein ? Je t'en supplie, ne me laisse pas tomber ! Tu es trop gentil pour ça... s'il te plaît... merci :-)

**[Bled]** Réécris ce texte au passé composé, en soulignant les verbes en rouge et les sujets en bleu :

Je participe à un projet d'édition de bandes dessinées. Je reçois 47 pages à relire. Le texte est écrit en espéranto. Je relis attentivement les pages. Je note mes remarques dans le wiki.

**[gros dur]** Dis donc, p'tit gars, t'aurais pas oublié quek'choz ? Ouais, c'est à toi qu'je parle ! Et regarde moi quand j'te cause !!! Alors, j'en fais quoi des planches du p'tit Spirou ? Tu crois qu'c'est pour retapisser les chiottes que j'ai passé mes soirées à les mettre en page ? Bon, alors grouille-toi, t'as 2 jours pour les lire et t'as intérêt à m'filer ton rapport quand j'te l'demanderai, sinon t'as pas intérêt à recroiser ma route.

**[épistolaire]** Cher ami, cela fait bien longtemps que je ne vous avais écrit et j'espère que ce délai ne vous aura pas trop inquiété. J'ai été en effet très occupée ces derniers temps car j'ai travaillé sur la mise en page d'une nouvelle BD en espéranto. Je profite donc de l'occasion pour vous demander si vous vouliez bien relire le texte avant l'envoi à l'imprimeur. Je sais que votre emploi du temps est chargé mais vous m'aviez déjà dit que cette activité vous intéressait beaucoup. Je me permets donc de vous envoyer les 47 pages traduites en espéranto, vous pouvez les relire et me répondre rapidement.

**[littéraire]** Le samedi après-midi, il reçut un courrier d'Emmanuelle lui annonçant que les 47 pages du petit Spirou étaient prêtes et qu'il pouvait dès lors les relire. Il avait déjà beaucoup travaillé sur la traduction et la perspective de repasser une journée sur ces pages vues déjà maintes fois ne le réjouissait guère. Néanmoins son amour du travail bien fait fut le plus fort. Il décommanda sa soirée du samedi soir et le pique-nique du dimanche et se mit tout de suite au travail.

**[sms]** lé 47 paj du ti Spirou en Eo son prêt. se srè bi l 2 lé relir rapideman è 2 fair vos remark dan l wiki. mrci bokou.

**[déprimé]** Il fait gris, j'en ai marre de ce temps pourri. Encore un week-end triste à pleurer qui s'annonce. A la télé, c'est toujours aussi nul... le cinéma, j'ai pas envie.... Qu'est-ce qu'il reste ? La lecture. Parlons-en de la lecture ! 47 pages du petit Spirou à relire avant l'envoi à l'imprimeur.... et en espéranto, en plus.... je ne sais plus quoi faire, je suis dans l'impasse. Pourquoi leur ai-je dit que ce projet m'intéressait ? Plus rien ne m'intéresse de toute façon, et je n'intéresse personne non plus... bon, tant qu'à m'ennuyer, je vais les relire quand même ces pages, au point où j'en suis, il ne pourra rien m'arriver de pire...

**[contractuel]** : Monsieur, en réponse à votre lettre du 20 août dernier, je me permets de vous retourner les 47 planches du petit Spirou contenant le texte en espéranto. Afin que nous puissions procéder comme convenu à la suite des opérations, nous vous serions gré de bien vouloir relire ces planches et de vérifier que rien ne manque en paraphant chaque page. Pour toute remarque éventuelle, nous vous demandons de bien vouloir suivre la procédure habituelle et de les consigner dans le wiki.

**La réponse ne se fait pas attendre : dans l'après-midi tout le monde se remet au travail et l'album est entièrement relu et vérifié avant la fin du week-end. Bravo et merci à tous !**

Emmanuelle

PS : ne me demandez pas ce que j'ai fait à manger le samedi 27 août à midi, je ne m'en souviens plus

# ESPERANTO DESPERADO

**Antaŭ nelonge, precize la 20an de aŭgusto, la dana/pola/bosnia bando Esperanto Desperado anoncis oficiale sian disiĝon...**

**Du monatojn poste oni rakontas, ke la bando povus pluekzisti sed konsisti el aliaj membroj ... Tio estas tamen nur rumoro... Por klarigi iomete la situacion, Amir, la gitaristo kaj kanzonverkisto, tute afable akceptis respondi kelkajn demandojn.**



## 1. Unue, la granda demando, KIAL via bando ne plu estas??

Bando estas, ĝis kiam ni kune ne decidis alie. Vasta estimata publiko estis bedaŭrinde false informita pri la esto de la bando. Iu el la grupanoj ne plu volas ludi, sed tio ne signifas ke la grupo ne plu estas, kelkfoje eĉ kontraŭe tio povas plifortigi la grupon. Sufiĉas du por la grupo, ĉu ne? La anoj renkontiĝos verŝajne fine de septembro kaj diskutos la eston aŭ ne eston, la demando de demandoj.

## 2. Kio estas via plej bona memoraĵo dum tiuj desperadaj jaroj?

Plej bona memoraĵo? Hu, multaj. Vojaĝoj, ĝuado de malfrua posttagmezo kun bandanoj en tuluza kafejo proksime de KAFE-ejo - jaro 2000, saŭnuro en Finnlando dum KEF 2000, sunumado je la sabla plaĝo ĉe Montpellier.

## 3. Kiu kanzono laŭ vi plej bone reprezentas la bandon?

Bona demando. Laŭ mi, tiuj kiuj plej bone sonis dum la ĉijara KEF kaj IJK. Se vi volas nomojn, mi dirus, «Fatalino», «Ska virino», «Feliĉe», «Grava», «Dancu», «Ĉu vivas vi?», ktp.

## 4. Kial estis tiom ofte ŝanĝo en la konsisto de la bando?

Mi ne dirus ke estis tiom oftaj sangoj, konsiderante preskaŭ 10 jarojn da aktiveco. Helle, Kim, mi, kaj iom poste Brian estis tie de la komenco. Drumistoj ni ofte sangis. versajne car neniu de ili interesigis pri la lingvo. Nis, nia nuna drumisto, fakte montris ian intereson dum la lasta IJK..

## 5. Vi certe estis unu el la plej dancigaj kaj etoskreantaj esperantaj bandoj. Kiu bando/artisto, laŭ via opinio, nun plej bone kapablos movi la korpojn de junaj esperantistoj?

Junaj je spirito aŭ je korpo? Ha, ha, estas multaj. Dolchamar, Denis Rock, JoMo kaj

Liberecanoj, Flavio Fonseca, Krio de Morto, Alexandro Cosavella, DJ Roĝero, DJ Kunar kaj certe multaj aliaj artistoj, kiujn mi forgesis aŭ eĉ ne konas.

## 6. Ĉu vi jam havas novajn bandajn aŭ persojnajn projektojn?

Jam aperis al mi kelkajn ideojn pri novaj kantoj. Mi bezonas helpon de aliaj muzikistoj por finfari ilin kaj prilabori la aranĝojn.

Por daŭrigo de kunlaboro mi klopodas interesigi ĉiujn nunajn «Desperadanoj» krom Kimo, kiu jam anoncis sian rezignon pri kunlaboro kun fiulo Amir :).

Mi ankaŭ planas daŭre kunlabori kun aliaj

artistoj de la «Esperanta mondo», speciale poetoj, verskreatoj, teatrumantoj, DJ-oj, video-artistoj kaj muzikistoj. Ekzemple lastan monaton, Anja Karkainen, fama finna verkistino sendis al mi unu poemon, kaj jam aperis bela melodio sur bazo de ĝi. Nun mi sendos al ŝi kelkajn melodiojn. Eble ŝi trovos iun tekston.

Se estas interesatoj por kunlaboro inter viaj legantoj, mi volonte aŭdus de ili.

## 7. Ĉu vi estas fanoj de la «Eagles» (la usona bando)?


**(mi diras tion pro la nomo de via bando kaj la titolo de via lasta albumo ;))**

Ooooh, mi ŝategas «Eagles» kaj mi esperas, ke ilia aŭro disvastiĝos sur ni, ke ni faru same bonan muzikon.

## 8. Vi ofte ludis antaŭ ne-esperanta publiko, kiel reagis tiu publiko al via esperanta muziko?

Mi ne ripetis tion kun muziko kaj universala lingvo. Sur scenejo oni ŝvitas, kelkfoje fluas sango. De scenejo oni sendas ridetojn, larmojn, energion, emociojn. Multaj reagis al ricevitaj sentoj. Al niaj sentoj, plej multaj, plej ofte bone reagis. Esperantistoj tamen ĉiam iom pli bone.

Lulu



1-a KD:

Jen venas...Brokantajoj'  
(Vinilkosmo, Francio, 2001)

Eldonis Francio, 2001

Kantolisto:

1. Jen venas... / 2. Grava / 3. Festeno / 4. Amantino / 5. Lando de amo / 6. Espo-Despo / 7. Sola / 8. En la mateno / 9. Felice / 10. Am iris for / 11. La anaso kaj la simio / 12. For! / 13. Ska virino

2-a KD: 'Hotel' Desperado'

(Vinilkosmo, Francio, 2004)

Eldonis Francio, 2004

Kantolisto:

1. Ska ritmo / 2. Ci nokte / 3. Ĉu vivas vi? / 4. Kial? / 5. Dancu / 6. Sunradio / 7. Fatalino / 8. Omage al Marie Schroeder / 9. Hotel Desperado teksto / 10. Mi malbenas militon / 11. Ne permesas / 12. Filo mia!



# VERDAJ kaj NIGRAJ ŜERCOJ



## KLARVIDO

Kruko vekigās post okul-operacio, kaj trovas la kirurgon apud la lito. Li malforte demandas : Kaj do, kia estis la operacio, s-ro kirurgo ? La kirurgo respondas : Nu, mi kontentas diri al vi ke ni sukcesis savi vian maldekstran okulon.

Kruko : Tio estas bonega novaĵo.

La kirurgo : Jes. Kaj ni donos ĝin al vi kiel memoraĵon kiam vi forlasos la malsanulejon.

## MALLONGVIVA, SED ĈIAM POZITIVA

Kuracisto : Mi bedaŭras informi vin... ke restas al vi vivi nur tri minutoj !

Kruko: Tri minutoj ! Sed kion mi faru ?

Kuracisto : Eble boligi ovon....



## AMIKA RANGO EN LA SANGO

Kruko : Mi estas tre kontenta.

Baniko : Kial ?

Kruko : Mi ĵus aliĝis al la Amikaro de Drakula.

Baniko : Ĉu vere ? Kion oni devas fari por aliĝi ?

Kruko : Oni simple sendas sian nomon, adreson, kaj sangogrupon.

## ĈU DONACO ?

Du fratoj malfermas siajn kristnaskdonacojn. La unua frato ricevis kvazaŭ monton da donacoj, dum la dua ricevis nur unu ludilon.

«Ĉu vin ne naŭzas ricevi nur unu donacon», mokas la unua frato, «dum mi ricevis dekojn ?»

«Tute ne gravas», respondas la dua frato. «Ja ne mi havas kanceron....»

## KIA FLEGO PER SIMPLA SEGO !

Malkontenta patrino : Joĉjo, kie estas via frateto ? Kaj kion vi faras per tiu segilo !?

Malica Joĉjo : Ĉu vi parolas pri mia... duonfrato ?

## FINANCA KONSULTO: KVAZAŬA SEPULTO

Kruko konsultas sian financo-konsiliston : Mi ŝatus frue emeritiĝi. Ĉu tio finance eblas ?

La konsilisto : S-ro Kruko, mi kontrolis vian pensian planon, kaj ankaŭ vian investaron, kaj mi povas diri ke vi estas tre bonstata por la cetero de via vivo....

Kruko : Tio estas bonega novaĵo....

La konsilisto : ... kondiĉe ke vi mortos venontan mardon.

## STULTAJ BESTOŜERCOJ

1. Ĉu vi scias kial ĝirafoj havas tiom longan kolon ?

Respondo : Ĉar iliaj piedoj odoraĉas.

2. Kiu besto havas nigrajn kaj blankajn striojn kun ruĝaj makuloj ?

Respondo : Malsana zebro.


## PROBLEM-PLENA ULO...

Mia konatulo havas problemojn. Li suferas sendormecon kaj disleksion kaj estas agnostikulo. Dum duono de la nokto li kuŝas sendorme, demandanta al si ĉu vere ekzistas iu Ido.


## Humura leciono pri etna geografio

(nur por esperantistoj!)


**N-ro 1:** Kial la birdoj en aŝkento kaj Samarkando neniam sukcesos drinki vinon rekte el la botelo?

**Respondo:** Ĉar ili estas uzbekaj... 

**N-ro 2:** Kial parto de la loĝantoj de Himalajo estas malhelaj?


**Respondo:** Ĉar ili estas Nepalaj... (NE PALAJ) 

**N-ro 3:** Kial la Dublinanoj neniam kuras?

**Respondo:** Ĉar ili vivas en Irlando... 

(IR LANDO)

**N-ro 4:** Kial la danaj esperantistoj insistas pri tio, ke ĉiuj loĝantoj de la mondo estas Danoj?

**Respondo:** Ĉar laŭ ili ekzistas Danoj kaj ... 

alilandanoj


**N-ro 5:** Kial sinjorino el Litovio ege ofendiĝis pro mi dum la lasta Kongreso, post la vespera balo?


**Respondo:** Ĉar mi demandis ŝin: kie estas la litovia sinjorino? (LITO VIA, SINJORINO) 



## Resumo:

Se vi ridis- bonege!

Se vi ridetis- ankaŭ bone ! 

Se vi ne komprenis- legu denove (espereble tiam vi ridos)! 

Sed se vi komprenis sed tamen ne ridis- tuj Kabeu!

Amikece, Josi Shemer Kongresa Numero 125

Homo grave malsanas en hospitalo. La familio kunvenas en la atendejo.

Laca kuracisto alvenas, kaj, afliktita, diras : «Mi alportas malbonajn novaĵojn. La nura eblo por supervivo estas cerbo-grefto. Estas eksperimenta operacio, tre riska, kies ĉiujn kostojn vi devos pagi.»

La familio estas konsternita. Unu el la familiajnoj demandas :

«Kiom kostas cerbo ?»

«Dependas», respondas la kuracisto, «vira cerbo kostas 5000 € kaj virina cerbo 200 €.

Ĉiuj silentas dum longa tempo. La viroj provas ne ridi kaj evitas rigardi la virinojn.

Iu scivolemulo tamen aŭdacas demandi :

«Sinjoro kuracisto, kial tiuj malsamaj prezoj ?»

La kuracisto ridetas, kaj respondas :

«La virinaj cerboj malmulte kostas, ĉar ili estis uzataj».



## JEFO-estraro / bureau d'Espéranto-Jeunes

Prezidanto : Axel Rousseau	45, rue de Sully / 92100 Boulogne Billancourt	tél. : +33 6 63 70 11 32 / axel@esperanto-jeunes.org
Vic-prezidanto : Sébastien Merlet	4, route de la Raimbaudière / 41800 Houssay	tél. : +33 6 77 37 49 88 / sebet@esperanto-jeunes.org
Kasistino : Julia Hédoux	45, avenue Charles de Gaulle / 62200 Boulogne-s/mer	tél. : +33 6 17 06 80 70 / julia@esperanto-jeunes.org
Vic-kasisto (et relations TEJO) : Sébastien Montagne	43, place Drouot / 45140 St Jean de la Ruelle	tél. : +33 6 60 66 48 02 / sebastien@esperanto-jeunes.org
Sekretario : Cyrille Poulet	103, av. Verdier / 92120 Montrouge	tél. : +33 6 77 28 13 25 / cyrille@esperanto-jeunes.org
Vic-sekretario : Aleks Kadar	13, av. de Wagram / 75017 Paris	tél. : +33 1 44 09 84 39 / aleks@esperanto-jeunes.org

## JEFO-komitato / conseil d'administration

Alexandre Poulet	9, rue Camille Saint-Saëns / 95480 Pierrelaye	tél. : +33 1 34 21 99 84
Belonia Gabalda	40, chemin des Berges / 91290 La Norville	belonia@esperanto-jeunes.org
Benoît Fonty	10, rue Bonne Louise / 44000 Nantes	tél. : +33 2 40 69 48 95 / benoit@esperanto-jeunes.org
Christophe Chazarein	200, rue Ursule Devals / 82000 Montauban	tél. : +33 6 33 93 92 81 / christophe@esperanto-jeunes.org
Emmanuel Debanne	8, rue de Cotte / 75012 Paris	tél. : +33 6 68 33 78 14 / emmanuel.debanne@free.fr
Enguerran Massis	27 rue Auguste Bravard / 63500 Issoire	tél. : +33 4 73 89 96 18 / godotl@voila.fr
Fabien Tschudy	6 rue des Cavaliers / 68700 Aspach le Haut	tél. : +33 6 87 20 67 31 / fabien.tschudy@esperanto-jeunes.org
François Parchemin	Chemin du Font du Broc Quartier ste Roseline 83460 les Arcs-sur-argens	tél. : +33 6 77 12 56 61 / parch.parchemin@laposte.net
Grégoire Colbert	63, rue de la Tour D'auvergne / 77185 Lognes	gcolbert@voila.fr
Maxence Dupuis	5, rue Guillemilot / 75014 Paris	tél. : +33 1 43 20 31 67 / maxence@esperanto-jeunes.org
Pascal Leclaircie	10, rue Jean-Jaurès / 91300 Massy	tél. : +33 6 66 28 02 30 / pascal@esperanto-jeunes.org
Pierre Gontier	La Huardière / 50540 Isigny	tél. : +33 6 83 71 04 13 / pierre.gontier@esperanto-jeunes.org
Sébastien Erhard	13 TER rue Raymond Botté / 76380 Canteleu	tél. : +33 6 15 21 48 93 ou 06.15.21.48.93.
Tatyana Malazh	18 rue des Gatines / 75020 Paris	tél. : +33 6 78 11 12 33 / tania0282@yandex.ru

## Coordinateurs régionaux

Violette Walther - <i>Alsace</i>	6 rue Philippe Rueff / 67800 Bischheim	tél. : +33 6 81 74 05 56 / walter.violette@wanadoo.fr
Magali Lajus - <i>Aquitaine</i>	1, les Places / 33910 Sablons	magalilajus@yahoo.fr
Pierre Gontier <i>Basse-Normandie</i>	La Huardière / 50540 Isigny	tél. : +33 2 33 48 04 67 / pierregontier@netcourrier.com
Vincent Pacheu <i>Provence-Alpes-Côte d'Azur</i>	Vallon de la Tour de Keyrié 13100 St-Marc-Jaumegarde	tél. : +33 4 42 24 95 83 / mpacheu@libertysurf.fr
Sébastien Erhard - <i>Bretagne</i>	36 B, rue de la Corderie / 22000 St-Brieuc	tél. : +33 6 15 21 48 93 ou +33 2 96 68 55 21 henri@esperanto-jeunes.org
Alain Droyer - <i>Bourgogne</i>	14, rue Maxime Guillot / 21240 Talant	tél. : +33 3 80 55 68 83 / alain.droyer@esperantoland.org
Xavier Dewidehem <i>Nord-Pas-de-Calais</i>	1, allée de l'Archerie / 59800 Lille	tél. : +33 3 20 04 12 15 ou +33 6 75 60 14 75 dewidehem@lve-esperanto.com
Maité Gayet - <i>Ain</i>	les Vignes / 01310 Montcet	maitochette@hotmail.com

## Coordinateurs départementaux, urbains et contacts

Axel Rousseau <i>Île-de-France</i>	<i>voir JEFO-estraro</i>	
Thomas Genty <i>Bourg-en-Bresse</i>	961, chemin de Corneloup - Valuisant le Bas 01250 Villereversure	tél. : +33 4 74 30 60 89 / pierregenty@planetis.com
Cyrille Poulet <i>Hauts-de-Seine</i>	<i>voir JEFO-estraro</i>	
Céline Bernard <i>Orange</i>	Résidence Lou Mistrau (D) 74, av. Rodolphe d'Aymard 84100 Orange	tél. : +33 6 30 97 23 88 ou +33 5 96 69 55 80 celine.bernard@esperanto-jeunes.org
Emmanuel Villalta <i>Paris (contact)</i>	4, rue Florence Blumenthal 75016 Paris	tél. : +33 1 45 27 42 35 ou 08 70 06 26 86 manu@esperanto-jeunes.org
Laurent Vignaud <i>Pays de la Loire (contact)</i>	3, allée du Haras (app. 132) 49100 Angers	tél. : +33 2 41 20 19 40 / laurent.vignaud@numericable.fr
Rose Sanz <i>Val-de-Marne</i>	63, rue André Tessier 94120 Fontenay-sous-Bois	tél. : +33 1 48 73 57 72 / Rsanz@esperanto.org


## Autres coordinateurs

Cours Internet : Ingrid Malaquin (ingrid@esperanto-jeunes.org) et Emmanuelle Richard (emmanuelle@esperanto-jeunes.org)

BEMI – Cycliste : Xavier Godivier xgodivier@esperanto.org / tél. : +33 2 99 22 99 07 ou 08 73 17 02 55 (tarification locale)

Recettes des weeks-ends gourmands : Rozenn & Clément Picard : rpicard@esperanto.org / tél. : +33 2 23 50 13 35





Tardo la 23an

11a	Filmgrupo
12a30	Tagmanĝo
14a30	Reĝo akordeon
17a	Apertivaĵoj
18a	Usparmanga
21a	Taĉto, ŝanĝo, etna
00a	akto filmo



CE L' TRANKVILUL'

Ĉu vi volas domi / akomodi kun mi ?  
 Ĉu vi preferas karamiĉojn ?  
 Ĉu vi ŝatas noklajn paroladon en antaŭo  
 Ĉu vi loĝas sole ?  
 Ĉu vi kaptas kandomojn ? Kiam el-  
 ni plaĉas al vi ?



Festo 2005



Stock (Volapük, CD Lernu, Tintin, Gaston) ???

